

& Je la naskiĝtago de Zamenhof post la mondmilito:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 1102 paŝoj dum 13 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (1919, Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Drako Longa, Norda Kantaro #4414, disduigante strofojn kaj versojn. Klarigo (*): '27 Temas pri Trianona traktato enjaro 1920.>

(#Melodio:

<:29>

(/miimimi mire reldo do;do dodo dore miimi;mi mimi mimi milre mi;mi soso fami mimi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire; do rere re; rere mire doTi La;So So LalTi do))?

)×38)+

(&Strofoj:

'1 /Nun pri armil' kaj vi2ro, ; pri paca batalanto ; el fund' de l' kor' ekso2nu ; laŭdanta nia kanto!

(×:; **Bruas danco en halo; dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas ni en esperantokunven'.**)

'2 Ĉar kreis li miraklon, ; la tutan homan genton ; per am' unuigontan ; miraklan fundamenton.

'3 El mondo de l' barakto, ; malam', batalo, pelo ; li volis montri vojon ; al alt-brilanta celo,

'4 kaj montris li la vojon ; de l' savo kaj de l' bono! ; Sed, ho, orelojn surdajn ; atingis la admono.

'5 „Ho, mia kor'!“ li kantis, ; ĉar kaptis lin doloro: ; Pro tuta mond' doloris ; la granda nobla koro,

'6 Por sangverŝanta mondo ; ĝi sangverŝante batis. ; Kaj kun doloro fajra ; ĝi amis kaj kompatis.

'7 Vir' milda kaj modesta, ; sed forta kaj decida, ; nek batoj de la sorto, ; nek homa mok' perfida

'8 starigi povis baron ; al lia fajrintenco, ; li luktis per espero, ; obstino, pacienco.

'9 Kaj en batal' li mortis, ; se ankaŭ ne per sabro. ; Ĉevalo de l' milito ; galopis tra l' kadavro,

'10 Lin la Teruro venkis, ; sur lia freŝa tombo ; baraktis kun pafita ; flugil' la packolombo....
.....

'11 Ĉu longe furiozos ; la pereiga flamo, ; ke ankaŭ ami povas ; la hom' nur per malamo,
.....

'12 ke amon al patrujo ; per tio li ekmontras, ; ke al nacio fremda ; malbenon fulmotondras?
.....

'13 Ĉu nin do turmentados ; eterne la malbeno, ; ke genton de la gento ; forbaras malkompreno,

'14 ke al aligentanoj ; la lango estas muta ; kaj, se parolas, sonas ; nur blasfemad' balbuta?

'15 Ĉu do ankoraŭ longe ; la hont' terura restas, ; ke hom' al homo lupu, ; kruela lupu estas,

'16 ke patro testamentas ; malamon al la ido, ; ke venkas kaj triumfas ; rikane la perfido?

'17 Ke ruz' diabla estas ; la diplomata moro, ; ke la mortigon lertan ; ornamas brila gloro?
.....

'18 Ke oni masbuĉadon ; en nom' de Di' aranĝas ; kaj ke la pli potencaj ; la pli malfortajn manĝas?

'19 Jen estas mi Hungaro ; per ĉiu bat' de koro, ; per ĉiu gut' de sango, ; per ĉiu gut' de ploro...
.....

'20 Mi forte radikiĝas ; en kara ter' nacia, ; el ĝi suĉita estas ; ja tuta forto mia.

'21 Kaj volas mi, ke ĝia art', ; manier', kulturo ; kunbrilu en la pompo ; de l' paca mondkonkuro

'22 Ĉar per pereo ĝia ; pereus io bela, ; perdiĝus kvazaŭ unu ; kolor' de l' ark' ĉiela.
.....

'23 Etendas mi la brakojn ; por frata ĉirkaŭpreno ; malsate je konsento, ; soife je kompreno

'24 kaj streĉas sin rigide ; al manoj miaj pacaj ;
indulge ne manplatoj, ; sed pugnoj nur,
minacaj.

'25 Forsonas en dezerto ; la plorobtuza voko. ;
Ho mian sekan gorĝon ; kunpremas jam
sufoko.

'26 Detruas en animo ; terura kataklismo ;
Amata mia lando ; baraktas en abismo!

'27 Ho, super ĝia kapo glav' ; Damoklesa
pendas, ; al la pli promesinto ; landpartojn oni
vendas.*

'28 Kaj ploras, ĝemas, plendas ; la forŝiritaj
korpoj, ; samkiel ĉe la tombo ; de la patrin' la
orfoj.

'29 Mi tamen ne blasfemas, ; malbenojn mi ne
sendas, ; laciĝis jam la brakoj, ; de longe sin
etendas.

'30 Nun ilin, kun la lasta ; eksving' de l'
malespero ; eklevas mi, kriante ; el maro de l'
sufero:

'31 Ho, vi spirit' benata ; de l' paca batalanto ;
estingu la inferon ; de la nacia vanto!

'32 Ekfulmu via lumo ; en malespera nigro, ;
ke ektiminte kuru ; la diskarnanta tigro,

'33 la tigro verdokula ; de l' malkonkord',
jaluzo, ; de l' rabinstinkt' nacia, ; de la perfida
ruzo,

'34 ke estu fine sekaj ; la fontoj de la ploro ;
kaj unu la ŝafaro, ; kaj unu la pastoro.

'35 Ke ŝultro ĉe la ŝultro ; laboru ĉiu lando, ;
kunplektu ilin forte ; de l' amo florrubando.
.....

'36 Sur via kun adoro ; florornamita tombo ;
ekflugu kun sonanta ; flugil' la packolombo.
.....

'37 Kaj kiel Dioniza ; festen' per unu fojo ;
ekmuĝu tra la tero ; la ditiramb' de ĝojo,

'38 ke fine, sub la signo ; de l' verdaluma stelo,
; alvenu, ho alvenu ; sur teron la ĉielo.)